

Ora Ĵurnalo

numero 6, aprilo 2018



Al la tuta mondo:

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Paĝo

3. Espeporko denove rekomendas. Komentoj de la legantoj pri la 5a numero de Ora Ĵurnalo. Pri Skandinava Kongreso en majo. Pri Ora Ĵurnalo.

4. Studieförbundet Vuxenskolan.



Esperantosabato 7 aprilo: Pri minoritata lingvo – la jida. *Interesa prelego de Staffan Böös, instruisto pri la jida lingvo.*

6. Juda Paska manĝo (Seder-manĝo). *Margareta Andersson rakontas pri kiel la judoj celebras sian "paskon".*

7. Anekdotoj. *El "Veckan" de 1904.*

8. Nacia festotago por popolo sen lando. *Temas pri la romaoj.*



Naŭruzfestajn salutojn el antikva Samarkando!

9. MedLearn havis malferman tagon en Lerum. *Temas pri kursejo por fariĝi subflegist(in)o.*

La etoso de la malferma tago estis gaja.

10. Aprilskämt. *Inga om sitt lyckade skoj.*



LASSE MAJA
(Lasse-Maja)

11. Iamaj krimuloj – la ŝtelisto Lasse-Maja.

12. La fama krimulo en la malliberejo Härlanda, Gotenburgo. Aliaj famaj malliberuloj.

13. Inventema krimulo en Usono.

14. Tips från Inga: Något om POD-radio på nätet.

Nova restoraciejo en Gotenburgo – kun la nomo "Zamenhof". *Kaj ĝi troviĝas ĉe Esperantoplatsen!*


15. "Lingvokompreno en Eŭropo" – ankoraŭ alia lingvoprojekto. Flugvojaĝo en nuna mondo. *Kerstin Rohdin pri sia fluga aventuro.*

17. Letero de Augustin Kokozwa. *Pri la situacio de la afrikaj samideanoj.*

19. La Pigo – multkolora kaj ruzlerta birdo. *Informa medito de Ingegerd.*

20. Vegana foiro. *Siv vizitis interesan foiron.*

21. Kiam oni havos veganajn gastojn. *Recepto de Puff Östling pri vegana kuko. Manĝaĵoj kun memoroj. Pri interesa kuirlibro.*



22. Ture Sventon i Warszawa. *Det sista avsnittet av Folke Wedlins berättelse.*

26. Sommardagar i Göteborg – prova en intensivkurs i Esperanto 2018.

Kovrilpaĝa bildo: la iama malliberejo de Härlanda.

Espeporko denove rekomendas



- Zorge prilegu ĉiun numeron de Ora Ĵurnalo! ☺

- Komentu la enhavon, kaj kontribuu per propraj artikoloj!
- Plusendu la ĵurnalon al viaj geamikoj, admonante ilin fariĝi membroj de Ora Klubo (100 SEK/jare al la konto 4 36 12 – 1. Bv noti ke temas pri Ora Klubo). La monon ni uzas por la lupago.
- Diru al ili ke estas pluraj eblecoj lerni kaj uzi esperanton, ekz. per DuoLingo.com, Lernu.net kaj en la Esperantosabatoj (la unuan ne-ruĝan sabaton monate).
- La 15an ĉiumonate estas Ora-Klubo-kunveno. Pri la aktuala loko vidu nian hejmpaĝon www.esperanto-gbg.org

Komentoj de la legantoj pri la 5a numero de Ora Ĵurnalo

“Oni ne ĉiam scias kiu skribis kion.”

“La rakonto de Folke Wedlin pri Ture Sventon vere estas leginda!”

+ Plural pozitivaj reagoj – sen precizigo de iu aparta paĝo.

Pri la Skandinava Kongreso en majo

Ankoraŭ estas loko por pliaj partoprenontoj. Margareta kaj mi iros de Gotenburgo per aŭtobuso al Oslo, kie ni enŝipiĝos.

Legu pli pri la Skandinava Kongreso en numero 4–2017 de *La Espero*.

La plej grava demando: **Ĉu iu pretas eniri la SEF-estraron??** Vi estas bezonataj! Ĝis nun la elekta komitato malsukcesis, sed ni ja ne konas ĉiujn membrojn. /Siv

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. Aperas neregule. Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com. Kontakto iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





En Gotenburgo ni havas tre bonan kunlaboron kun "Studieförbundet Vuxenskolan i Göteborg". La klubo havas eblecon pruntepreni ĉambrojn kaj komputilojn, ricevi helpon por kopii materialon por kursoj k.t.p.

Johanna Nordström estas la kontaktpersono por la Klubo. Ŝi estas tre afabla kaj helpema kaj donas ĉiam ĝojan rideton.

La agadĉefo nomiĝas Göran Thomte kaj li kondukas la Gotenburgan sekcion dum longa tempo.

Birgitta Norsted estas la ekonomiistino kaj tenas la ekonomiajn aferojn en bona ordo.

La koncepto, pri kiu SV laboras, estas "La stud-rondoj", kaj en la Gotenburga Esperanta klubo ni havis kaj havas multajn cirklojn dum longa tempo. Jes, SV en Gotenburgo estas vera amiko por bona esperanta laboro. /Ingegerd



Esperanto-Sabato 7 aprilo: Pri minoritata lingvo – la jida

La jida estas ĝermana lingvo, kiu estas parolata de ĉirkaŭ 3,5 milionoj da aŝkenazaj judoj en la mondo. Ĝi ekestis en la dekunua jarcento en regiono, kiu nun estas parto de Germanio.



Staffan Böös

"Aŝkenaz" (el Genezo 10:3) estis la mezepoka hebrea nomo por tiu regiono. La jida lingvo (svede jiddisch) estas bazita sur la malnova germana (70%), sed havas ankaŭ vortojn el la hebrea kaj aramea (15%), kaj kiam la

judoj pro ĉikanadoj migris pli orienten, la lingvo kaptis vortojn el slavaj lingvoj (15%), precipe el la pola. La lingvo havas multajn dialektojn, sed komence de la dudeka

jarcento oni starigis iaspecan skribnormon bazita de la litova jida dialekto.

Kiam ekestis judaj kulturaj centroj en pluraj orienteŭropaj landoj dum la deksepa kaj dekoka jarcentoj, la jida fariĝis la ĉefa lingvo inter la tieaj judoj. Oni rigardis ĝin kiel ĉiutagan lingvon kaj la hebrea daŭre estis la lingvo por religiaj studoj. En la jida mem la lingvo nomiĝas *mame loshen*, la lingvo de panjo. Oni verkis jam tiam ankaŭ beletron en la jida. En 1978 Isaac Bashevis Singer ricevis la nobelpremion de literaturo. Li verkis en la jida kaj pri tipaj judaj temoj. Fine de la deknaŭa jarcento multaj judoj elmigris al Usono kaj en Novjorko eldoniĝis eĉ jidlingvaj tagĵurnalojn. En la sionista movado estis vigla diskutado ĉu la jida aŭ la novhebrea estu la oficiala lingvo en Israelo. La jida estis malpli estimata, rigardata kiel lingvo de la virinoj.

La nombro de jidlingvuloj kreskis ĝis la dua mondmilito, kiam oni taksis la nombron de

jidparolantoj je ĉ. 11 milionoj, el kiuj 63% vivis en orienta Eŭropo, precipe en Litovio, Pollando, Ukrainio kaj Belorusio. Ĝi estis la tria plej granda lingvo el la ĝermanaj lingvoj. En la dua mondmilito la nazioj murdis ĉ. 5 milionojn el la jidparolantoj.

Tiu katastrofo, kune kun la decido, ke en Israelo oni parolu la novhebrean, estas la kialoj ke la jida lingvo ŝajne estas mortanta lingvo. Ĝi vivas ankoraŭ en kelkaj grupoj, kiel inter la ortodoksaj judoj en Usono kaj Israelo, kiuj ne volas uzi la hebrean kiel ĉiutagan lingvon. En Svedio la lingvo fariĝis en 2000 unu el la oficialaj lingvoj de minoritatoj, kvankam estas tre malmultaj parolantoj en Svedio, de 250 ĝis 6000 parolantoj, depende de kiel oni taksas la lingvoscion.

La vortaro ja ricevis la plejmulton el la malnova germana, sed la gramatiko ne. Ankaŭ la elparolo diferencas de la germana, la jida ne havas la germanajn sonojn ŭ kaj ö. Göteborg estas Geteborg, la lasta g elparolata k. Elstara dialekta diferenco ene de la lingvo estas la elparo de u, kiu fariĝis i, kiel en "jida", kiu simple signifas juda. Oni skribas la jidan de-dekstre maldekstren per la hebreaj literoj, kun kelkaj kromsignoj. Se oni transskribas ĝin per latinaj literoj povas tiu, kiu scias la germanan, kompreni multon. [Vikipedio kaj Staffan Böös]

Alia grupo, la sefardaj judoj, posteuloj de judoj en Hispanio kaj Portugalio, evoluigis novan lingvon – la ladino – el la hispana kun vortoj el la hebrea, araba kaj aliaj lingvoj. Ĉirkaŭ 2,2 milionoj da sefardaj judoj troviĝas – la plejparto en Israelo, Francio, Usono, Argentino kaj Hispanio. La vorto "sefardaj judoj" signifas "judoj en Hispanio", kiuj estis forpelitaj en 1492, kiam la kristanoj venkis la muzelmanojn en la Iberia duoninsulo. [Vikipedio]

Pri tiuj kaj multaj aliaj aferoj prelegis **Staffan Böös**, instruisto pri la jida en Gotenburgo. Laŭ li la jida pli kaj pli malaperos. La parolantoj estas maljunaj kaj la junuloj uzas la ĉefan lingvon de la lando, kie ili loĝas.

Staffan mem ne havas jidan fonon de sia hejmo, sed interesiĝis pri la jida kulturo, aparte pri tiu de Pollando, kie li trovis sian edzinon. Staffan donis al ni jidajn vortojn, kiujn ni provis traduki. Vortoj ligitaj al la korpo estis

facilaj –
almenaŭ se oni havas bazan konon pri la germana. Kelkaj vortoj samas kun la svedaj ekz. *arm*, kiu kaj signifas brako kaj malriĉa.



La jidaj vokaloj estas interesa ĉapitro. La vorto DVD (דיד) – sen vokaloj – signifas David. Tamen troviĝas kvin vokaloj – same kiel en esperanto. Iu en la aŭskultantaro diris ke la gotenburga dialekto onidire enhavas la plejmulton de vokaloj en tuta Eŭropo!

Staffan substrekis la similecon inter la jida kaj esperanto. Ambaŭ estas minoritataj lingvoj. Ambaŭ "naskiĝis" en orienta Eŭropo. Ambaŭ estis persekutataj de diktatoroj. Periode Stalin ankaŭ malpermesis la jidan. Zamenhof parolis plurajn lingvojn, inter ili la jidan. Li eĉ verkis gramatikon de la jida.

Ni forgesis demandi ĉu la jida havas avantaĝon de Interreto – kiel Esperanto. Googlane oni ricevas 1 730 000 trafojn por la jida, kaj 70 600 000 trafojn por esperanto.

Staffan montris lumbildojn pri lokoj, kie Luduviko Zamenhof estis. Unu el la bildoj estis de lia tombo en la hebrea tombejo de Varsovio. Staffan ankaŭ scias pri Valdemar Langlet, pri kiu ni aŭskultos la venontan

Esperanto-sabaton 5/5. Langlet ja savis multajn judojn en Budapeŝto.

La esperanto-klubo jam dufoje kantis "Donna-donna" (almenaŭ la refrenon). La teksto estas pri bovido survoje al buĉado, sed la temo aludas al la suferoj de la judoj. Staffan legis la originan jidan tekston por ni kaj Lasse Granat legis la esperantan tradukon por li.

La aŭskultantaro – 14 personoj – havis multajn demandojn al Staffan, kaj ni esperas ke la kontakto daŭros.

Koran dankon, Staffan pro interesa prelego!
/Siv kaj Andreas



Ni provas legi la jidan tekston.

Juda Paska manĝo (Seder-manĝo)

Margareta Andersson partoprenis en Seder-manĝo, kaj skribas pri la sep punktoj, gravaj por la judoj.

1. Nomo

Pasko de la hebrea vorto "pesach" = preterpasi, angle: "passover". Ĝi ankaŭ nomiĝas "la solena festo de la nefermentinta pano".

2. Tempopunkto

Ĝi estas festita je la unua plenluno de la unua monato de la juda jaro, kiu nomiĝas "Nisan". Ĉi-jare oni festis la paskon la 29an de marto. La plenluno okazis marde la 30an de marto. La pasko daŭras dum sep tagoj, 14–21 Nisan. Fakte la Pasko estas la unua tago kaj la Soleno de la nefermentinta pano la ses sekvantaj.

3. Historio

Pasko estis festita la unuan fojon de la Israela popolo en Egiptujo (Eliro – dua libro de Moseo – 12:6–10) kaj poste ĉiun jaron pro la memoro pri la saviĝo el Egiptujo kaj pro la interligo inter Dio kaj la popolo de Israelo. Celebrata inter judoj tra la tuta mondo.

4. Preparado

Ĉiu fermentinta pano kaj ĉiuj fermentintaj nutraĵoj en la hejmo estas serĉataj kaj detruataj dum zorgema printempa purigado. Komparu kun 1 Kor. 5:6–8, kie la apostolo Paŭlo parolas pri la fermentaĵo de la malboneco.

5. La pasko dum la tempo de Jesuo

La paskaj ŝafidoj estis buĉitaj la 14an de Nisan inter la sesa kaj naŭa horoj en la templo. En la jaro 33 p.Kr. la 14an estis vendredo. La ŝafido devis esti senmanka kaj ne kripligita. La dommastroj formis vicon antaŭ la pastroj, kiuj ricevis ilin en duoblaj vicoj. La sango estis plupasigita en arĝentaj bovloj al la altaro, kie ĝi estis elverŝita je la bazo de la altaro. Fluejo forkondukis la sangon. Restaĵoj de ĉi tiu kanalsistemo ankoraŭ restas en la roko centre de la Omara moskeo/la Roka moskeo. Parto de la ŝafido estis oferita sur la brulofera altaro, la reston oni kunportis hejmen kaj rostis por la manĝo.

Rimarku! Nenie estas menciita en la evangelioj, ke Jesuo kaj liaj disciploj manĝis la paskan ŝafidon.

Evidente oni kolektiĝis en la antaŭa tago (la Sanktan Ĵaŭdon). Jesuo mem estis la ŝafido, kiu estis buĉita je la naŭa horo.



La juda seder-manĝo. La diversaj simbolaj pladoj aludas al la foriro de Israelo el Egiptujo.

En Jerusalemo ĉiuj domoj estis plenaj de pilgrimantoj, kiuj estis alvenintaj kaj de Palestino kaj de aliaj partoj de la Roma Imperio. Oni ankaŭ tendumis sur la Olivmonto. Oni kalkulas ke pluraj centmiloj da judoj kolektiĝis en Jerusalemo por celebri Paskon en la tempo de Jesuo. Oni dividis sin en kunmanĝantaroj kun ĝis 20 personoj. Oni devis manĝi interne de la muroj de Jerusalemo.

Ofte oni kunvenis en "ĉambro en la supra etaĝo", t.e. sur la horizontala tegmento. Longa tablo estas pretigita kaj oni kuŝis ĉetable sur tapiŝoj kaj kusenoj en rondo, apogita de la maldekstra brako. La kutimo venis kun la romoj kaj memorigus ke nun ili estas sendependaj civitanoj, kaj ne plu sklavoj. La dommajstro kuŝis ĉe la fino de la tablo kaj tiu, kiu estis dekstre de li, kuŝis "ĉe lia brusto".

Sur la pentraĵo de Leonardo da Vinĉi, "La eŭkaristio", kiu poste inspiris al multaj pentraĵoj, Jesuo sidas meze de la tablo.

6. Sur la tablo

- ❖ Tri rondaj kukoj de nefermentinta pano, bakita de faruno, salo kaj akvo antaŭ la dommastro.
- ❖ Bovlo kun sala akvo (por memorigi pri la larmoj en Egiptujo kaj pri la akvo de la Ruĝa maro).
- ❖ Plado kun amaraj herboj, hebree "maror" (kreno por memorigo de la amara tempo en Egiptujo).
- ❖ Bovlo kun pomkaĉo, miksitaj kun cinamo kaj ruĝa vino, hebree "charoset" (kiel memoro de la argilo por la brikoj).
- ❖ Pastinako aŭ aliaj printempaj frumaturaĵoj (memore al la sezono).
- ❖ Ovoj, rostitaj sur ardaĵo.
- ❖ Viando de la paska ŝafido (nur ĝis la jaro 70, poste osto de ŝafido).
- ❖ Ruĝa vino en pokalo.
- ❖ La ordo por la manĝo, hebree "Haggada", al ĉiuj partoprenantoj.

7. La ordo de la manĝo

Ĝi komenciĝis ekzakte je la sunsubiro, kiam tri steloj estis videblaj sur la ĉielo. La tablo devas esti preparita antaŭ la mallumiĝo kaj la komenco de la festotagoj. La sabato ĉiam komenciĝas la antaŭan vesperon (komparu kun nia antaŭfesta preĝo!).

Ĉiuj estas feste vestitaj, preĝaj ŝaloj kaj "kippa" (kapvesto).

Fine de la manĝado, kiu enhavas pli da ceremonioj ol kiuj estas menciitaj ĉi tie, ĉiuj diras: "Venontan jaron en Jerusalemo!"



Anekdoto

La patrino: "John, ĉu la konscienco ne diras al vi, ke vi agis malĝuste?"

La filo: "Jes, panjo, sed mi ne kredas ĉion, kion mi aŭdas."

Nacia festotago por popolo sen lando



La romaa flago.

Temas pri romaoj – sed la rubriko ankaŭ povus validi por esperantistoj.

Göteborgs-Posten havis artikolon la 9an de aprilo:

Dimanĉe (8 aprilo) la romaa flago flirtis plurloke en Gotenburgo. En la Martrafika Muzeo oni celebris la tagon per kantoj, muziko, paroladoj kaj podia diskuto.

Domino Kai, mem romao kaj ĉefo por la Romaa agado de Gotenburgo, kantis la romaan nacian himnon *Gelem, gelem* (Mi vagis, mi vagis).

En la Gotenburga regiono, la ĉirkaŭaj komunumoj inkluditaj, troviĝas preskaŭ 10 000 romaoj.

En aŭtuno 2017 oni fondis *Rådet för nationella minoriteten romer* (La Konsilantaro por la romaa minoritato), en kiu troviĝas kaj reprezentantoj por romaaj grupoj kaj politikistoj.



La konsilantaro laboras por malkreskigi la malfidon, kiu ankoraŭ ekzistas inter romaoj kaj la majoritata socio. En Svedio romaoj vivas almenaŭ ekde la 16a jarcento kaj hodiaŭ ili estas unu el la kvin naciaj minoritatoj.

Do, Gratulon al romaoj, kiuj havas reprezentanton en la EU-parlamento – Soraya Post. /Siv



Naŭruzfestajn salutojn el antikva Samarkando!

Karaj geamikoj,

Ankaŭ en 2018 la Internaciaj Letertagoj "Assalom, Navro'z! – Saluton, Naŭruzo!" bone sukcesis. Multenombre alvenis leteroj kaj aliaj materialoj el plej diversaj partoj de la terglobo.

Pluraj reeĥoj estis publikigitaj en nialandaj paperaj aŭ/kaj retaj periodaĵoj. La vortoj 'Esperanto' kaj 'esperantistoj' diversloke renkonteblas en la artikoloj. [...]

Ni refoje dankas al **ĉiuj** partoprenintoj en nia Naŭruz-festa leterprojekto, dezirante al vi kaj al viaj familianoj sanplenajn kaj belajn printempajn tagojn! [...]

Amikajn salutojn,

Anatoli Ionesov

Enciklopedia projekto "Samarkandiana"
P.O. Box 76
UZ-140100 Samarkando
Uzbekio

imps86@yahoo.com

MedLearn havis Malferman Tagon en Lerum

"Medlearn" estas organizo, kiu troviĝas en 15 lokoj en Svedio, i.a. en la komunumo Lerum, samlima kun Gotenburgo. La ĉefa administrejo troviĝas en Stokholmo. Temas pri edukado de prizorgado kaj flegado, intermiksita kun studado de la sveda. La lernantoj devenas de multaj landoj – la plejparto el Sirio, Afganistano kaj Eritreo.

La 28an de marto la lernejo invitis al "Malferma tago". Wafa, kiu loĝas ĉe mi, invitis min.



La skeleto, kiu apud la enirejo bonvenigis nin, estas prizorgata de Chien, instruisto pri la sveda kaj Wafa, lernanto. La instruisto pri la zorgado/flegado, Khristina, donas al la skeleto (mian) koltukon por ke ĝi ne malvarmumu!

Gaja knabo renkontis nin kun afiŝo kun la teksto: "Ni esperas ke vi havos bonan tagon".

La etoso de la Malferma Tago estis gaja

La edukado de Medlearn ampleksas kaj teorion kaj praktikon, kaj de tempo al tempo ili faras studvizitojn. Laŭ la statistiko de MedLearn 75 % de la gelernantoj jam post la unua praktiko ricevas laborpromezojn. Krom la lernejoj kaj hejmtaskoj – multaj jam laboras en maljunulejoj. La gelernantoj estas

tre afablaj, agrablaj kaj kreivaj. Mi demandas min ĉu estas por ke ili estas enmigrintoj aŭ por ke ili estas estontaj prizorgantoj kaj flegantoj. Mi estas danka al Wafa, kiu enkondukis min en tiun interesan mondon!
/ Siv Burell



La komunuma respondeculo por la sukcesa projekto, Inger Shakarchi, staras la dua de maldekstre. La aliaj venas el la Filipinoj, Sirio kaj Eritreo. Kial oni venas de la Filipinoj, kie ne estas milito, al Svedio, mi demandas. – Por la amo de svedo, estis la respondo. Wafa el Sirio sidas kaj ripozas antaŭ ol li bakos 120 vaflojn.



Lernantino mezuras mian sangopremon. Bedaŭrinde ĝi estis sufiĉe hipertensia. Kion fari? "Vi devas promeni pli", iu respondis. Hmmm ... sed mi ĵus venis de la linia danco, kiu vere postulas energion. Mi ankaŭ ricevis masaĝon al miaj manoj – agrable!

Teatraĵo Chien (en la maldekstra bildo) rakontas pri projekto, kiun la lernantoj mem faris. Temas pri "La sama traktado de ĉiu homo". Nova lernantino venis al la klaso. Unu el la lernantoj mokis ŝin. Neniu el la klasanoj helpis ŝin. Ŝi defendis sin, sed estis malgaja.

Tiu mokanta lernanto ankaŭ ne aŭskultis la instruistinojn, sed turnis sin malantaŭen kaj de tempo al tempo spektis sian mobiltelefonon.

Sed la rektoro alvenis kaj admonis la gelernantojn kondukti sin dece kaj trakti ĉiun homon dece kaj egale, aŭskulti la instruistinojn kaj helpi unu la aliajn.

La aktoroj ricevis varmajn aplaŭdojn kaj iu el la spektantoj diris, ke ili devus iri al klasoj en la bazaj lernejoj en Lerum. Oni fariĝis pensemaj post la teatraĵo.



Aprilskämt

Aprilskämt har långa traditioner. Det första publicerades redan 1846 i en brittisk tidning.

En annons beskrev en åsnevisning i Londons utkanter, men alla nyfikna människor som åkte dit tvingade inse att de själva var åsnorna.

Inga berättar

Jag vill bara berätta om mitt lyckade aprilskämt, som jag genomförde då jag i början på 80-talet jobbade på rederiet Transatlantic.

Mitt kontorsrum låg väldigt nära kopieringsapparaten, vid något tillfälle hade vi just bytt från Rank Xerox till Canon och jag var en av de få som kunde fixa apparaten när den havererade.



På eftermiddagen den 31 mars, innan jag skulle avsluta mitt arbete och gå hem kopierade jag fem små bilder av EnDumEn (från filmen Dunderklumpen) på vänster nedre kant av fem ark kopieringspapper.

Dessa blad blandade jag sedan in (som man blandar spelkort) i bunten med nya papper i kopieringsapparaten. Men jag hade också uppsikt att ingen annan på kontoret såg detta. (Vi hade en jobbig typ som mer eller mindre bodde på kontoret och kunde oväntat dyka upp när som helst)

Nästa dag den första april hände detta. Till en början med märktes inget eftersom de preparerade arken fanns en bit ner i bunten. Men så är det en man som ska göra 10 kopior av en bokslutsrapport. På en av dessa dyker EnDumEn upp i vänster marginal, där det inte är någon text.

Han blir naturligtvis mycket förbryllad men går vidare. Ytterligare 4 kollegor får vid olika tillfällen EnDumEn på sina kopior. Ryktet sprider sig då om detta aprilskämt och en annan kollega tycker detta var så roligt att han står och kopierar massvis av kopior och

får naturligtvis ingen EnDumEn, för jag talar ju inte om att det bara fanns 5 möjligheter.
/Inga

"Star Wars: Sweden Edition"

Den uppmärksammade flytten av Kirunas stadskärna påverkar inte bara bostadshus, enligt Uppsala Nya Tidning. Även raketbasen måste flytta – och ska nu placeras i Ärla strax utanför Eskilstuna. En av anledningarna ska vara att det svenska försvaret behöver kunna värja sig mot hot från yttre rymden. Tur att allt var ett aprilskämt – i en redan stökig omvärld är rymdkrig det sista vi behöver.

Iamaj krimuloj – la ŝtelisto Lasse-Maja

Lars "Lasse-Maja" Molin, naskita Lars Larsson (1785 – 1845), venis de la paroĥo Ramsberg en provinco Västmanland. Li estis sveda krimulo, kiu faris ŝtel-ekskursojn en la urba regiono Stockholm–Örebro–Västerås. En sia juneco li estis konata pro siaj humoraĵoj, malemo al laboro kaj ŝtelado.

Periode li vivis kaj montris sin jen kiel viro, jen kiel virino. Foje, kiam li estis dungita kiel servistino en grandbieno, la junviroj tre scivolemigis pri la nova knabino kaj ŝtelrigardis tra la ŝlosiltruo. Granda rivelado! La nova, juna knabino rasis sin!

Lars Molin estis malliberigita en la kastelo de Marstrand plurajn fojojn, sed kelkfoje sukcesis fuĝi, kion oni konsideris neebla. Foje li maskovestis sin per la vestaĵoj de la edzino de la komendant. En biografio pri li oni povas sperti vere avanturan vivon kaŭze de



LARS MOLIN
(Lasse-Maja)

ŝteladoj: vergopunoj, malliberejoj, kastelprizonado kaj – reĝkontaktoj.

Lasse-Maja estis fifama, aŭ eble ankaŭ admirata pro tio ke li "ŝtelis de la riĉuloj kaj donis al la malriĉuloj". Vere – malvere, oni ne scias. Li ankaŭ estis fama pro sia kuirado. La kronprinco Oscar invitis lin al sia ŝipo, kiam li vizitis Marstrand. Lasse-Maja estis petata rakonti pri siaj aventuroj kaj la legendo diras, ke la patro de Oscar, Karl XIV Johan, kaj

ŝatis la manĝon kaj la rakonton de Lasse-Maja. En 1838 Lasse-Maja ricevis amnestion de la reĝo. Poste li fariĝis farmisto kaj ekloĝis ekster Arboga en Västmanland. Li mortis la 4an de junio, 1845, en sia bieno.

/Siv kaj Ingegerd

La fama krimulo en la malliberejo Härlanda, Gotenburgo

Lasse Strömstedt komencis sian vivon per devojiĝo. Li dediĉis sin al misuzo kaj krimo. En la somero 1952 kiam li havis 17 jarojn li estis kondamnita por la unua fojo al 18-monata mallibereco en Härlanda pro aŭtoŝteloj kaj enrompoj.

Ĝis 1971 li alternis inter nefakaj laboroj kaj prizonrestadoj. Post tiam li ŝanĝis siajn ideojn por sia vivo. Li komencis labori kiel verkisto, debatisto kaj aktoro. Li skribis kune kun la ĵurnalisto Christer Dahl romanojn sub la pseŭdonimo "Kennet Ahl" sed li ankaŭ skribis proprajn romanojn.

Li estis edzo tri fojojn. La unuan fojon kun la aktorino Rebecca Pawlo dum la jaroj 1979–1984 kaj la duan kaj trian fojojn kun la kantistino Ann-Christine Bärnsten dum la jaroj 1987–2009. Lasse Strömstedt mortis en julio 2009, kaŭze de pulma kancero.



Lasse kiel 14-jara konfirmoto


"Grundbulten" (fundamenta bolto) estas romano sub la pseŭdonimo "Kennet Ahl" de 1974. La romano priskribas la malliberejon

"Hall" en sociokritika perspektivo. La titolo "Grundbulten" aludas al la fakto ke unu el la karakteroj ricevis la vizion ke la malliberejo estis fiksita per komuna bolto, "Grundbulten", kaj se ĝi malŝtraŭbiĝus la konstruaĵo disfalus. Oni do povus fuĝi kaj la malliberejo estus for.

"Grundbulten" estas uzita kiel metaforo por la tuta socio kiun oni povus ruinigi kaj rekonstrui. Nuntempe oni uzas la koncepton en la socia debato je la signifo "la bazo sur kiu la cetero de ĝi dependas".

Bonvolu legi pli en la reto: "Lasse Strömstedt var boven från Brynäs" av Ulf Ivar Nilsson. Gävledraget. /Ingegerd

Aliaj famaj malliberuloj



Barbro Alving "Bang", sveda ĵurnalistino, estis kondamnita 1955 al monata mallibereco pro rifuzo partopreni en civila defendekcerzo.

August Palm, la unua agitisto por socialdemokratio en Svedio, estis kondamnita

en 1888 al mallibereco dum tri monataj pro insultoj kontraŭ la parlamento.

Hjalmar Branting, socialdemokrata politikisto, suferis en 1889 tri kaj duono monatojn en malliberejo pro ofendoj kontraŭ la presleĝo pri religia kritiko.

Hinke Bergegren, socialdemokrata gazetisto: Pluraj malliberecoj interalie honorofendo. En 1911 mallibereco pro prelego pri "amo sen infanoj".

La bildo: La kastelo Karlsten en Marstrand estis finkonstruita en 1658, ĉefe per helpo de malliberuloj. Kasteloj ofte estis uzataj kiel malliberejoj. 1860 ĝi ĉesis esti malliberejo. Hodiaŭ multaj turistoj vizitas la kastelon kaj aŭskultas pri Lasse-Maja.

Jan Fridegård, verkisto: lam je 1918
Fridegård sidis en malliberejo kaŭze de ŝtelado dum la soldata periodo.

Ivan Oljelund, verkisto: 1916, ok monatojn en mallibereco pro ŝtatperfido.

Knut Wicksell, sociekonomikisto: 1909 du monatojn en mallibereco pro kritiko al la vortoj de Dio.

Isaac Grünewald, pentristo: 1926 li estis kondamnita al monata mallibereco pro ebri-tumulto en Bohusa trajnstacio kaŭze de trinkitaj drinketoj kaj aldonitaj batoj.

Alfred Ander: Ekzekutita en 1910. Li estis la lasta ekzekutito en Svedio. La kialo estis rabmurdo.

Ture Nerman, verkisto, estis kondamnita en 1939 pro kritiko kontraŭ Hitler. Li skribis artikolon sub la rubriko "Infera maŝino de Hitler". Li havis tri monatojn da mallibereco.

Jan Guillou, ĵurnalisto: La IB-afero donis en 1973 al Jan Guillou kaj al la kolego Peter Bratt

malliberecon kaŭze de senvualigo de sveda eksterdemokratia policorganizo kontraŭ spionado. /Ingegerd

La listo povus esti pli longa sed pro kiu valoro? La homaro sukcesis kaj malsukcesis en ĉiuj tempoj, sed ŝanĝi opinion estas ĉiam eble. "Erari home estas, kaj nur pardonas Dio" estas malnova popoldiro, kiu valoras memori. Ni ankaŭ povas memori la skribadon de "Eddan", kiu estas malnova norda skribita historio: "Neniu estas tiel nekapabla ke li tute ne taŭgas kaj neniu estas tiel bona ke li neniajn difektojn havas".

Fine ni memoras la bonan respondon en la biblio kiam Petro demandis: "Jesuo, kiom da fojoj oni devas pardoni sian proksimulon?" kaj mem proponas sep fojojn. Tiam Jesuo respondas: "Ne sep fojojn sed sepdek oble sep fojojn". Tiel oni povus kompreni ke neniu limo ekzistas. Ĉiuj homoj devus esti valoroj por unu la aliajn. /Siv

Inventema krimulo en Usono

Ĉu veras? (iama artikolo en Dagens Nyheter – La Novaĵoj de la Tago)

En Bristol Evening Post oni povis legi pri parkejo ekster Bristol Zoo.

La parkejo havis lokon por 150 aŭtoj kaj 8 kamionoj. Dum 23 jaroj la sama parkejgardisto deĵoris. Li estis tre ĉarma, tre



afabla. Li portis biletmaŝinon kaj la pago por aŭto estis 1 pundo kaj por kamiono 5 pundoj.

Pasintan lundon li ne aperis en sia laborejo kaj la estro de Bristol Zoo telefonis al la komunumo de Bristol petante ke oni sendu anstataŭanton, ĉar estis ĥaoso sur la parkejo. Sed la respondo estis ke la komunumo ne respondecas pri la parkejo. La estro demandis ĉu la parkejgardisto ne estas dungita de la komunumo. "Kiu parkejgardisto?" la komunumo demandis.

....

La gardisto malaperis el sia domo post 23 jaroj, dum kiam li ĉiun tagon gajnis al si ĉirkaŭ 400 pundojn. Sume 47 milionojn da svedaj kronoj. Neniu poste revidis lin. /Siv

Tips från Inga: Något om POD-radio på nätet

Om man vill höra esperanto talas finns många utmärkta POD-radiokanaler från olika länder att lyssna på.

Från **Madagaskar** sänder Henriel *Aminda Radio*:

<https://djpod.com/amindaesperanto>

Här kan man hitta program nr 73 och bakåt.

Dock meddelar Henriel att hans avtal kommer att upphöra med djpod.com. Och i fortsättningen får man

leta upp Aminda Radio på Youtube:

<https://www.youtube.com/channel/UCmqZo e9w7C070EZJijWXWAw>

Från **Australien** lyssnar man gärna på 3ZZZ, där en av medarbetarna Marcel fyllde 100 år den 7 dec 2017:

<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>



En något yngre medarbetarskara finner man hos Varsovia Vento i **Polen**:

<https://www.podkasto.net>

Där kan man också backa tillbaka i tidigare sändningar. Annars är ju klassikern från Polen *Pola Retradio*:

<http://pola-retradio.org>

Där kan man bl.a. njuta av Barbaras uppläsningar av fragment ur romanen "Quo Vadis" av nobelpristagaren Henryk Sienkiewicz i esperantoöversättning av Lidia Zamenhof.

Kina erbjuder fina uppläsningar på sin radiokanal under *Literature*:

<http://esperanto.cri.cn/html5/literature.htm>

Esperanta Retradio, kanalen där du kan höra och läsa texten samtidigt:

<http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html>

Till sist skulle jag vilja nämna Radio Havanna Kubo, men just nu kommer inget ljud, kanske har de blivit hackade. /Inga J

Nova restoraciejo en Gotenburgo – kun la nomo "Zamenhof"

En la iamaj lokaloj de trejniĝejo vid-al-vide al la Språkcaféet (Lingva Kafejo) en

Esperantoplatsen tri restoraciestroj – Daniel Brobäck, Jens Odén kaj Andreas Harrysson – ĵus malfermis la restoraciejon Zamenhof.

Entute la areo ampleksas 1200 kvadratajn

metrojn. Ili nomas la koncepton "Tri en unu"

– tri restoracioj: The Silver Lining, Café

Gazette och Mayday, kiuj havas iomete

diversajn stilojn, sed la komuna nomo estos


Zamenhof. Espereble Esperantoplatsen

denove estos centro por la esperantistoj. /Siv



Esperantoplatsen. La restoraciejo Zamenhof troviĝas dekstre, ekster la bildo.

"Lingvokompreno en Eŭropo"



Trovita en nia esperanto-biblioteko: *Eurolengo, the language for Europe – a practical manual for business and tourism* by Leslie Jones (Eurolengo, la lingvo por

Eŭropo – praktika manlibro por komerco kaj turismo de Leslie Jones).

"Eurolengo isto tres facil. Le lengo habo un diksionario de venti mil paroles. It isto kompletik fonetik and le difisile sonds in le lengos de West Europo isto eliminado." (Oriol Press 1972).

Kiuj estas la malfacilaj sonoj? demandas la aŭtoro retorike. En la **angla**: th, ough, ph. En la **hispana**: ll, guturala mola g, c kun lipsono, v elparolata kiel b, moligita ñ, z kiel th, kaj "fluantaj" r. En la **franca**: Ĉiuj nazalaj sonoj kiel an, en, in, on, un. Kaj u (kiel ö ekz. euil). En la **germana**: pf, w elparolata kiel v, v elparolata kiel f, guturala g kaj ch, j kiel y. En la **nederlanda**: guturala g kaj sch. En la **itala**: gli, c sonante kiel ch antaŭ kelkaj vokaloj, malmola ch. Kion li pensas estas la malfacileco en la skandinavaj lingvoj? – Jes ö/ø! Sed nur tiu sola sono! Mi pensis ke ankaŭ u (ne elparolata kiel en esperanto sed pli supre en la palato) estus problemo.

EUROLENGO		ESPERANTO	
<i>Persono A</i>	<i>Persono B</i>	<i>Persono A</i>	<i>Persono B</i>
Bon dag!	Bon dag, Senior!	Bonan tagon!	Bonan tagon, Sinjoro!
Vi isto vos?	Y isto tres bien, tak. And vos?	Kiel vi fartas?	Mi fartas tre bone, dankon. Kaj vi?
Habo vos lesado le gramar?	Si, Senior, and Y kompreno it.	Ĉu vi legis la gramatikon?	Jes, Sinjoro, kaj mi ĝin komprenis.
Isto vos horant my vox?	Si Siniior, Y isto horant voster vox.	Ĉu vi aŭskultas mian voĉon?	Jes, Sinjoro, mi aŭskultas vian voĉon
Kano vos skribar dis leson in Eurolengo?	Y penso ke it isto facil skribar it.	Ĉu vi povas skribi ĉi tiun lecionon Eŭrolenge?	Mi pensas ke estas facile skribi ĝin.

Mia aldono: Ĉi tiu libro apartenis al Ebbe Vilborg. Estas interese legi la komentojn, kiujn tiu lingvospertulo faris per kraĵono. Ekz. sur paĝo 3 sub la titolo Relativaj pronomoj (kel ur isto it? = kioma horo estas?) Ebbe notis: "Ne relativa pronomo!". Paĝo 44 (pri la vorto "ke"): Ebbe: "(la verkisto) ne komprenis

la gramatikon". Sur paĝo 64: le wurd "uttal?" Paĝo 24: Ebbe: "Ha!" parolante pri 8-monata bebo kiu havis – aŭ ne havis – sian unuan naskiĝtagon. Se Ebbe Vilborg antaŭe estus korektinta la libron ĝi certe estus pli logika, pli ĝusta. /Siv

Flugvojaĝo en la nuna mondo

Kerstin Rohdin rakontas pri vojaĝo kun pluraj malfacilaĵoj:

Mi ĵus revenis hejmen de mia printempa vojaĝo al mia familio en "Wild West" (Sovaĝa

Okcidento). Kun mia familio en Usono mi interkonsentis, ke la lastajn tagojn de februaro estus bona tempo, ke mi vojaĝu renkonti ilin. Jam frumatene la 26-an de februaro mi forlasis la hejmon por en bona

